


ORGANO DE
ASTURA ESPERANTO ASOCIO

CATEDRA DE EXTENSION UNIVERSITARIA



SCIENCFIKCIE...

"... Varsovio, iama ĉefurbo de unu el tiaj strangaĵoj nomitaj "nacioj", kiuj ekzistis en Planedo Tero antaŭ ol tie ekregis Kosma Racio;

Varsovio, "naskiĝurbo de Esperanto" (kiel atestas la laste eltrovitaj dokumentoj, de la XX-a jarcento, en Planedo Tero) gastos venontjare La Miljaran Jubilean Kongreson de Nia Interkosma Lingvo(kiun oni ankaŭ nomas precize ESPERANTO-n omaĝe al pseŭdonimo de tiu klarvidelstara geniulo Lazaro Ludoviko Zamenhof, kiu iniciatis Nian Interkosman Lingvon, kiam malsaĝo, nescio kaj netoleremo estis la komunaj trajtoj de la tiamaj gentoj loĝantaj la Planedon Tero, kiuj anstataŭ racie saĝi sovaĝe bestis!);-

Varsovio, do, atendas Vin, loĝantoj de l'Suna Sistemo, por partopreni en la Plej Grava Evento de la lastaj jarcentoj, nome tiu Miljara Jubilea Kongreso de la Interkosma Lingvo, kiu okazos de la 5-a ĝis la 30-a de Aŭgusto de la 2.887-a jaro.

Antaŭvidebla estas grandioza kaj epokfara Kongreso, ĉar kiam ankoraŭ mankas preskaŭ tutan jaron jam aliĝis al ĉi tiu Evento iom pli ol miliono da kosmaj civitanoj.

Laŭ informoj en la Unua Bulteno de la Kongreso, oni aranĝos parkejon por kosmoŝipoj en Kontinento Afriko en tiu loko konata kiel Sahara Dezerto.

Aliĝu frue!... "

(El "Magazinvideokasedo LKK (La Kosma Konscio)" de la 5-a de Julio de la 2.886-a jaro, dumonata ĉiutaginformilo, eldonata en Verdopoulus (Planedo Marso), kiun videaŭdis por Vi... ADONIS.)

Septembro - Oktobro 1.981 | Nº 22

NIA ANTENO

Ni alproksimiĝas al la nova jaro, kiam oni devas renovigi siajn kotizojn kaj al la esperanta gazetaro kaj al la esperantistaj asocioj. Ĉi rilate ni memorigas tiujn el niaj asturiaj gesamideanoj, kiuj estas membroj de Hispana Esperanto-Federacio (HEF), pri tio, ke HEF-kotizo por la venonta jaro 1982-a, laŭ decido de la Kongreso en Murcia, estas 750,00 pesetoj. Kaj al tiuj, kiuj ankoraŭ ne estas membroj de HEF, ni petas bonvolu aniĝi ekde nun. Por triumfigi nian Movadon ni bezonas ĉies helpon. Ju pli da membroj havu nia Federacio, des pli forta ĝi estos. Unueco estas Forto. Ĉiuj hispanaj gesamideanoj unuiĝu sub la ŝildo de HEF.

0 = 0 = 0 = 0 = 0 = 0 = 0 = 0 = 0 = 0 = 0 = 0 = 0 = 0 = 0 = 0 = 0

En lerno-ĉambro de la Katedro "Jovellanos" de Universitata Disvastigo, je la 5-a de Oktobro, okazis malfermo de la Komenca Esperanto-Kurso por la lerneja jaro 1981/1982, kiu komenciĝis kun partopreno de kvardeko da personoj. La Kurso, gvidata de nia sperta Prezidanto s-ano Santjago Mulas, prezentiĝas promesplena, ĉar ĉiuj gekursanoj montriĝas sincere kaj entuziasme interesitaj pri nia Lingvo kaj plejmulto el ili estas studentaj gejunuloj.

0 = 0 = 0 = 0 = 0 = 0 = 0 = 0 = 0 = 0 = 0 = 0 = 0 = 0 = 0 = 0 = 0

La Katedro "Jovellanos" de Universitata Disvastigo, en kies kadro funkcias nia Asocio, asignis al Ni subvencion de 25.000,00 pesetoj kiel helpo por nia Biblioteko.

El ĉi tiuj linioj kaj nome de nia membraro Ni esprimas nian sinceran dankon al la S-ro. Direktoro de la Katedro.

0 = 0 = 0 = 0 = 0 = 0 = 0 = 0 = 0 = 0 = 0 = 0 = 0 = 0 = 0 = 0

En la du sekvantaj folioj ni publikigas faksimile leterojn de nia s-ano. Oskar Trabanko adresitaj al S-rino. M. Teacher, kaj la koncernajn respondojn. S-ano Oskar Trabanko estas novbakita samideano, kiu posedas ankoraŭ nur kelkajn lernohorojn pri Esperanto. Ni publikigas la tekston de lia esperantlingva letero sen iu ajn korekto, kaj petas vian senkulpigon pro la eraroj.

Niaopinie la leteroj de la "Foreign Office" bezonas nenian komentarion.

= 0 = 0 = 0 = 0 = 0 = 0 = 0 = 0 = 0 = 0 = 0 = 0 = 0 = 0 = 0 = 0 = 0 =

Ni havas je via dispono Loterion por la Kristnaska Lotado, okazonta la 22-an de Decembro 1981-a en Madrido. NUMERO 59.901.-

0 = 0 = 0 = 0 = 0 = 0 = 0 = 0 = 0 = 0 = 0 = 0 = 0 = 0 = 0 = 0 = 0

Gijón 15 de Junio de 1981

Excelencia:

Con el mayor respeto a tu persona y cargo de primer ministro de la que fué nación más poderosa del Globo, me decido a la colaboración en pro del bienestar mundial de hombres y mujeres que nos toca vivir en ésta época que por todas partes se oye de crisis de valores humanos, de crisis de felicidad y en cambio de proliferación de rebeldía que la mayor parte de los humanos y de esa juventud sin principio ni fin donde no hay <u>moral sana</u> y si <u>moral destructora</u> (salvo excepciones), de inteligencia y buenas costumbres.

Creo Excelencia, que se llegaría a un final grandioso, si los dirigentes de la naciones, ven con agrado la menos dificil de las formas de entenderse entre sí, entre todos los humanos, teniendo un idioma común que a todo el mundo beneficie y le obligue a sacrificar lo mínimo pero a todos un poco.

ESPERANTO se llama la solución y en 10-15 años el mundo se habría agigantado en adelantos, mejor aún se empezaría comprobar el bienestar si esto se lleva de una forma organizada empezando por los niños en los colegios y los niños lo enseñan en sus casas y la Televisión colabora, etc.

Se acabarían las guerras, que no las quiere nadie más que quien no sabe pensar "porque lo que no quieras para tí, no lo desees a los demás". Ya hace muchos siglos que esa verdad se tiene olvidada y como consecuencia así brilla la felicidad generalmente en desaparición en el Mundo entero.

Es un honor que desearía compartieras para que un día se te - recordara como LA DAMA MAS HUMANA Y DIGNA que tuvo Inglaterra.

Profunda felicidad te deseo en compañía de los tuyos

A.f.f.m.o.

Oskar

Exmª. Srª. Dñª. Margaret Teacher
10 Down Street
LONDRES



Foreign and Commonwealth Office
London SW1A 2AH

Telephone 01-

Rte Oscar Trabanco Suárez
c/D-4 no 7 (Cruz de Ceares)
Gijón - Asturias
Espana

Your reference

Our reference

Date 7 July 1981

Dear Sir

I have been asked to reply to your letter of 15 June to the Prime Minister on the subject of Esperanto.

Whilst an internationally agreed common language might have many advantages in fostering mutual understanding it would not be a practical proposition. British Government policy is to promote the use of English as an international language it is recognised (as such) by most international organisations and enjoys general acceptability.

Yours sincerely

R M Harris

R M Harris
Cultural Relations Department

By air mail
Par avion

Rte Oscar Trabanco Suárez
c/D-4 no 7 (Cruz de Ceares)
Gijón - Asturias
Espana

Gijono 3-9-81

Tre estimata Srº:

Rilate al via vidpunto, estas kompreneble ke por vi angloj, nur estas pli praktika ĉio kio estas angla, sed de la interna vidpunto, estas pli praktika lingvo neŭtrala, tio estas lingvo apartenanta al neniu nacio, kaj la tutmonda espero estas, ke por feliĉigi la homaron ne estas sufiĉa iu ajn nacia lingvo, angla aŭ ne angla, sed pere de neŭtrala lingvo; kaj mi devas aldoni: Neniu scias ĉu io ajn estas praktika ĝin, kaj mi aldonas ke la politiko de ĉiuj britaj registaroj ĉiam estis ia kulpo pri la marŝo de konfuzio de l'mondo kaj la superregi kio ĉiam trudi, tia estas la rezultoj; Kiuj landoj estas pli falsaj, raboj, krimoj, parazitoj, drogistoj kaj malordo?; Kiuj landoj estas pli vero, liveri, feliĉa, laboraj, atletoj kaj ordono?

Mi deziras komprenigi vin ke via Prime Minister jam multe malfamigis tra la tuta mondo kaj ke nun ŝi devas montri tial amo al la homaro, kaj la pli bona maniero, por la estonteca gloro.

Vi povas diri al via Prime Minister, ke mi multe bedaŭras se mi devas paroli tiamaniere, kaj se tenas al bone ke ŝi estu kiu respondu, neniu alia persono devas fari pro ŝi.

Multaj dankon.

Povas traduki:

Lomdona Esperanto-Klubo
Fred Tallant Hall
153 Drummon Street
LONDON N. W. 1



Foreign and Commonwealth Office
London SW1A 2AH

Telephone 01-

Rte Oscar Trabanco Suárez
c/D-4 no 7 (Cruz de Ceares)
Cuijon - Asturias
Spain

Your reference

Our reference

Date 15 September 1981

Dear Sir,


Thank you for your letter of 3 September addressed to Mr R M Harris. Your comments have been noted.

Yours Sincerely

S D Pattison
Cultural Relations Department



If undelivered return to:
FOREIGN &
COMMONWEALTH OFFICE
KING CHARLES STREET
LONDON
SW1A 2AH





Rte Oscar Trabanco Suárez
c/D-5 no 7 (Cruz de Ceares)
Cuijon - Asurias
SPAIN

SKIZO PRI LA URBO **MURCIO**



Kiam ni alvenis Murcion, por partopreni en la XLI-a Hispana Kongreso de Esperanto, ni pensis trovi malgrandan kaj malnovan urbon, preskaŭ dormanta, apud la rivero Segura, sed nia surprizo estis grandega; Murcio, la kongresurbo de la ĉijara Esperanta Kongreso, estas granda, bela, kaj gastama urbo, kiu entenas 300.000 loĝantojn.

Novaj kaj modernaj konstruaĵoj flankas ĝiajn purajn kaj ampleksajn stratojn kaj ĝiaj parkoj kaj placoj estas bele ornamitaj.

La muzeoj estas tre interesaj kaj diversaj; Salcillo, Arkeologic, Belartoj, Internacia Regiona Kostumaro, Katedrala Muzeo, Araba Murego, Diego Mateo Zapata, ktp.

En Murcio ankaŭ estas monumentoj, kiaj Katedralo, Kazino, kelkaj paroñejoj kaj monañejoj, palacoj, ktp., en kiuj oni povas trovi multe da artaj verkoj.


La loĝantoj de Murcio estas tre agrablaj kaj ĝentilaj, ili ĉiam estas pretaj helpi kaj gvidi la "eksterlandanojn"; ni povis konstati ĝin, ne nur unu fojo, sed multaj fojoj. Se murciano rimarkas ke iu, en iu ajn strato, dubas pri la ĝusta adreso, si rapide klopodos klarigi al li la aferon aŭ akompanos la dubanton ĝis la celo.

La murciaj virinoj estas belaj kaj simpatiaj, ili sin vestas elegante kaj moderne, kaj kiam ili promenas tra la stratoj kaj promenejoj, ili kaptas ĉiujn virajn rigardojn, ĉar ilia marŝo estas speciala.

Murcio, same kiel Gijono, havas "vojon de la vinoj" (ruta de los vinos), t.e. stratoj plenaj de trinkejoj, en kiuj la junularo kunvenas por trinki kaj paroli. Estas vidindaj ĉi tiujn trinkejojn plenplenaj de gejunuloj kaj ankaŭ la stratoj, ĉar kiam la trinkejoj estas plenaj ili trinkas aŭ kunvenas sur la stratoj, sidantaj sur la planko aŭ la veturiloj kiuj estas parkitaj ĉe la sojlo de la trinkejoj. Ĉi tiuj stratoj situas apud la Universitato, en la malnova kvartalo.

En la malnova kvartalo estas stratoj kiuj havas specialan ĉarmecon, tiaj kiel Platería, Trapería, kaj aliaj kies nomojn mi ne rememoras, sed ĉiuj ĉirkaŭas la Katedralon kiel gardistoj kiuj dezirus izoligi ĉi tiun juvelaĵon.

SaMuGá *



MURCIO.- Generala vidaĵo

* Kiel mi promesis en la pasinta "HELECO", mi raportas skize pri urbo Murcio.

Por venonta numero, mi raportos pri la murcia regiono, por fini la raporton okaze de pasinta Hispana Kongreso de Esperanto.

LA VOJO AL LA SENLABORECO

PROLOGO

Monatoj pasis kaj kun ili la vintro.
Ĝi estis, kiel ĝenerale la vintroj en la krizofrapita kapitalisma mondo, terura tempo de suferado por miloj kaj miloj da senkulpaj viktimoj de nia malbenita ekonomia kaj socia sistemo.La senlaboreco atingis neaŭditan gradon.Malvarmo, malsato, kaj malhelo pli ol iam regis en la loĝejoj de la mizeruloj, se ili entute ankoraŭ havis loĝejojn.Ĉie de matene ĝis vespere , homoj frostotremantaj, kun malplenaj stomakoj, frapadis la pordojn almozpetante, precipe en la kvartaloj, en kiu mem malriĉuloj vivas, ĉar en tiuj de la riĉuloj tre ofte ne malfermiĝas pordo al tia frapanto.
Ĉiufoje, kiam vespere iomete ekneĝis, staradis longaj serpentoj da laboremuloj antaŭ la dungejoj por neĝforigantoj.Multaj el ili, malsataj kaj nesufiĉe vestitaj, devis post kelkhora - starado en ventohurlo kaj neĝkirlo foriri aŭ esti forportataj. Kaj poste en la frua, ofte eĉ en la malfrua mateno, kiam oni komencis dungi neĝlaboristojn, okazis kortuŝaj interbataloj pro kelkhora laboro malbone pagata.Kiu foje vidis ĉi tion kaj kiel la centoj, kiuj ne estis tiom feliĉaj ricevi ŝovelilon, sin fortrenis kun malĝoje klinitaj kapoj, iuj eĉ plorante, tiu ne plu kuraĝos paroli pri mallaboremo de senlaboruloj.......

La ĉi-supra longa prologo estas eltirita de la libro. " Tur Strato 4 ",de nia samideano H.Weinhengst.La nura motivo pro ĉi tiu prologo estas montri al la leganto, ke la senlaboreco ne estas nova fenomeno, ĝi ja estas klasika malsano de la nomata ekonomio de merkato. La libro bone montras la situacion en kiu disvolviĝis la socio en Aŭstrujo - dum 1.929.

Eble ekde tiu dato ĝis nun, ni iom progresis, almenaŭ rilate la eksterajn aspektojn de nia ĉiutaga vivo.La realo evidente ne montras tiun progreson.La nuntempe tiel nomata okcidenta socio ŝanĝiĝis al nenio kompare al tiu priskribita de nia samideano H.Weinhengst, la formo kaj sistemo restas la samaj . Daŭre ekzistas diskriminacio inter la diversaj tavoloj de la socio, en kiu troviĝas riĉulo kaj malriĉulo, laboristo kaj mastro,Diferenciĝas nia nuna socio, rilate al tiu de 1.929, per la fakto, ne ĉiam reala, ke oni permesas al la laboristo havi iujn modernaĵojn, kiuj estas prezentataj de la burĝaro

kiel plibonigo de la vivnivelo.Ne estas mia intenco analizi ĉi tie, kiom oni devas labori kaj suferi por akiri tiujn – modernaĵojn, ofte verajn banalaĵojn, per kiuj la burĝa klaso intencas meti vualon sur la laboristajn okulojn, kvankam ni devas konfesi, ke ofte la kapitalistoj atingas sian celon.

Ni troviĝas en la okcidenta Eŭropo, en la zono de la merkatekonomio kun tre gravaj ekonomia kaj labora krizoj.Mi esperas, ke ĉi tiuj krizoj ne estos tiel severaj kiel tiu de la jaro 1.929, rakontita en " Tur Strato 4 " , kun tiel terura fino, ĉar ja ĉiu rolanto mortas, escepte tiu, kiu havis konstantan laboron.

Kiel estas la vojo al la senlaboreco ? Kial troviĝi sur tiu vojo ? Kio devas okazi por fariĝi senlaborulo ? La respondo estas facila, simpla kaj konkreta; ĝi estas, ke la posedanto de la fabriko, metiejo aŭ entrepreno decidu ĉesi la laboron.Aŭtomate ĉiu laboristo perdas sian laborpostenon.

Leĝoj, jes, leĝoj jam ekzistas,kiuj protektas la laboristojn, sed ekzistas iu leĝo, kiu nuliĝas ĉiujn aliajn: la rajto al la privata posedo, kaj en tiu tereno la mastro ja rajtas fari tion , kion li volas, ĉar vole aŭ ne vole la laboristoj jam estas parto el tiu privata posedaĵo, sendube kun aliaj kaj specialaj nuancoj, sed fine la laboristo estas plia ilo, eble la plej grava, sed ĉiukaze privata instrumento de la mastro, tiusence estas konsiderata la laboristo, tio ja estas fakto ne diskutebla.

Estas evidente, ke ne ĉiam kulpas la mastro pri la fermo de la laboristejo.Tre ofte, la malbona direktado de la ekonomio en la kapitalisma zono, kreas la kondiĉojn por ke la mastro de la entrepreno maldungu la laboristojn . Sed kvankam unualoke la fiasko devenas de la ne taŭga organizado fare de la burĝa socio, do, de li mem, la mastro ankaŭ – kulpas, ĉar aliaj, en la samaj kondiĉoj kiel li, kapablis trovi la rimedojn por eviti la fiaskon.Oni povas meti multajn aliajn argumentojn, sed la fakto kaj konkludo estas, ke la laboristo perdas sian laborpostenon, kio estas la malĝoja realo.

En la burĝa socio la leĝoj estas tiel bone miksitaj, ke kiam laboristo estas maldungata, la mastro demetas ĉiujn siajn respondecojn.Se iu laboristo deĵoris dum kvardek jaroj en iu entrepreno kaj la mastro decidas ĉesigi ĉian aktivecon, ĉi tiu perdas kiu ajn respondecon, kaj la kvardek laborjaroj havas nenian signifon por li, eĉ ne sentimentalan, ĉar li, la mastro, certe – diros: mi pagis al vi, do mi nenion ŝuldas al vi.Juste estus, ke tiu, kiu profitiĝis de la rento produktita de la – laboro, okupiĝos, en la malbonaj cirkonstancoj pri la necesoj de tiuj,kiuj ĉion donis al li: la laboristoj.

La kapitalisto, kiu konstante kritikas la ŝtaton, tiu ŝtato regata de li mem, ĉar li vidas en ĝi kontraŭulon – por siaj interezoj, ne hezitas eĉ unu momenton por meti siajn laboristojn sub la zorgo kaj respondeco de la ŝtato.Do, la mastro ne plu respondecas pri siaj maldungitaj laboristoj.

ĝi daŭros

Perletera Amikeco

ADRESARO DE LA ESPERANTA GRUPO EL URBO RZESZOW (POLLANDO)

Antaŭnomo, nomo, aĝo, adreso

1) Joanna Hadło 14 str. 2 sierpnia 13/23 PL-35-111 Rzeszów - Pollando
2) Marian Hadło 45 str. 2 sierpnia 13/23 PL-35-111 Rzeszów - Pollando
3) Maria Strama 26 str. Krasickiego 72 PL-37-200 Przeworsk - Pollando
4) Anna Telichowska 16 str. Korczaka 10/27 PL-35-114 Rzeszów - Pollando
5) Małgorzata Pasoń 16 str. Dabrowskiego 21/43 PL-35-036 Rzeszów - Pollando
6) Joanna Reizer 16 str. Krzywoustego 2/45 PL-35-077 Rzeszów - Pollando
7) Kalina Kozieł 25 str. Mochnakiego 19/7 PL-35-016 Rzeszów - Pollando
8) Danuta Bloch 25 str. Broniewskiego 24/56 PL-35-206 Rzeszów - Pollando
9) Zdzisław Kot 28 str. Jagiellońska 37/19 PL-35-035 Rzeszów - Pollando
10) Monika Lang 40 str. Rycerska 5/21 PL-35-241 Rzeszów - Pollando
11) Piotr Samolewicz 17 str. Kosynierów 6/37 PL-35-202 Rzeszów - Pollando
12) Jędrzej Kaca 23 str. Akademicka 6 PL-35-084 Rzeszów - Pollando
13) Jadwiga Antos 57 str. Podchorązych 2/31 PL-35-216 Rzeszów - Pollando
14) Marta Bobola 38 str. Słowackiego 11/25 PL-35-060 Rzeszów - Pollando
15) Bogusława Trzeciak PL-36-055 Bratkowice 265 woj. Rzeszów - Pollando
16) Maria Giera 20 PL-38-130 Frysztak Lubla 221 - Pollando

○●○●○●○●○●○●○●○●○●○●○●○●○●○●

Tomasz Kalka, Barcin 88-190, ul Pakoska 20/67 - Pollando.Li estas flegisto, dudek kvar jara, edziĝinta.Interesiĝas pri kutimoj kaj vivo en Hispanujo. Ankaŭ li korespondus hispanlingve.

●○●○●○●○●○●○●○●○●○●○●○●○●○●○

Stamenka Dimitrova, 2124 Bulgario, Botevgrad HNCK-NT.Laboranta en granda uzino, plaĉas al ŝi la legado kaj poezio.Si malavare rekompencos tiun, kiu havigos al ŝi la libron "Parnasa Gvidlibro.

○●○●○●○●○●○●○●○●○●○●○●○●○●○●

KAMPUĈIO.Se vi deziras korespondi kun esperantistoj el tiu lando, skribu al: S-ro Navuth - Esperanto Korespondado - Ministère de l'Education Nationale, PNOM PENH, KAMPUCIO.

●○●○●○●○●○●○●○●○●○●○●○●○●○●○

VJETNAMIO.Por korespondi, skribu al VPEA, 107 Guan Thán, HANOI

○●○●○●○●○●○●○●○●○●○●○●○●○●○●

LAŬLANDO (Laos).Bonvolu skribi al S-ro Chaleune, Ministère des Afferes étran-gères.Vientian, Laŭlando

●○●○●○●○●○●○●○●○●○●○●○●○●○●○

DISTROJ

Supo de literoj

P	O	M	I	A	N	O	J
O	P	E	Ŝ	M	I	T	O
K	L	A	O	B	O	N	E
A	U	I	P	O	M	A	S
B	G	O	R	S	N	D	E
A	I	P	E	O	U	N	D
I	L	P	S	U	B	D	I
T	O	P	O	R	O	A	S

Tiu ĉi kvadrato plena de literoj enhavas ses nomojn de laboriloj. Serĉu ilin! Por tio vi povas legi horizonta-le, vertikale kaj eĉ diagonale - en ambaŭ direktoj sed ne trans-saltu literojn.

Movoj de kavaliro

U 1	ES	ES	TAN,	TAŬ
TAN	ME	VI	TIN	PON
DU	ZU	RU	AN	TON
MO	TAN,	ES	TEM	TAN

Komencante - per la silabo U (nigre-ta), kaj laŭ la kavaliro movo en la ŝakludo, trovu konatan proverbon.

KOMPLIKA PROBLEMO

Kvar amikoj amuze kartludas dume aliaj personoj ilin rigardas. Unu el la rigardantoj observas ke:

1º) Johano ne kunportas kravaton.
2º) Petro fumas blondan cigaredon kaj sia ĉemizo estas brunkolora.
3º) La ĉemizo de tiu sinjoro, kiu fumas per pipo, estas blanka
4º) La sinjoro, kiu sidas dekstren de Antono, kunportas bluan kravaton.
5º) Tiu, kiu fumas nigran cigaredon, kunportas flavan ĉemizon.
6º) Ludoviko ne havas ruĝan ĉemizon.
7º) Tiu sinjoro, kiu fumas cigaron, ne havas kaŝtankoloran kravaton.
8º) Nigran kravaton havas tiu sinjoro maldekstren de Ludoviko.

Kun ĉi tiuj informoj, ĉu vi scius kiu sinjoro kunportas ruĝan ĉemizon ?

SOLVOJ AL LA ANTAŬAJ ENIGMOJ

MOVO DE KAVALIRO:
Kiu konstante lokon ŝanĝas, neniam sin aranĝas.

L	A	T	E	K	S	[illegible]	T
O	D	E	L	E	T	[illegible]	R
[illegible]	[illegible]	[illegible]	[illegible]	[illegible]	[illegible]	[illegible]	O
E	[illegible]	S	[illegible]	T	[illegible]	[illegible]	A
[illegible]	[illegible]	[illegible]	[illegible]	[illegible]	[illegible]	[illegible]	N
S	[illegible]	[illegible]	[illegible]	U	[illegible]	[illegible]	G
[illegible]	A	P	O	[illegible]	[illegible]	R	E
K	Z	E	R	C	[illegible]	I	L

KRUCVORTENIGMO:
Horizontale
1) Pesilo 2) V.Cedi.S 3) El.Do.Ec 4) Tio.Oni 5) Ero.Lui 6) Ro.To.Ig 7) O.Ordo.O 8) Aĝioti
Vertikale
1) Vetero 2) P.Liro.A 3) Ec.Oo.Oĝ 4) Sed.Tri 5) Ido.Odo 6) Li.Ol.Ot 7) O.Enui 8) Sciigo
HIEROGLIFO: Interesan romanon (Inter es an romano n)

M_S_ L_ K_T_N Ĉ__M _F_ND_S
K__ N_ R_SK_S, T__ N_ G_JN_S
TR_ S_LT_S L_ R_T_,Ĝ_N K_PT_S L_ K_T_
K__ L_M_ _KZ_ST_S, _NK__ _MBR_ TR_V_Ĝ_S
SP_RT_ M_N_ N_ R_ST_S S_N P_N_
R_ST_T_ K_L_MB_T_ N_ FL_G_S _L B_Ŝ_T_
PR_ M_LT_ D_ _RB_J, L_ _RB_R_N N_ V_D_S
B_R_L_ M_LPL_N_ S_N_S PL_J L__T_

EL "ESPERANTA PROVERBARO"

LA SUPRAJ OK LINIOJ ENTENAS OK PROVERBOJN, SED NUR ILIAJ KONSONANTOJ APE-RAS EN ILI, ĈAR ĈIUJ VOKALOJ ESTIS ANSTATAŬITAJ PER STREKETOJ. LA KONKURSA TASKO ES-TAS REMETI ĈIE LA ĜUSTAJN VOKALOJN KAJ TIEL TROVI LA KOMPLETAJN TEKSTOJN DE LA OK PROVERBOJ.